

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

dimanĉon, la 8an de Julio, 2017 • numero ses

## Hodiaŭ

- ★ 7:15 atm: Matenmanĝo
- ★ 8:30 – 12:15 ptm: Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- ★ 12:15 ptm: Tagmanĝo
- ★ 2:00 - 3:30 ptm: Ekzercado kun Katalin
- ★ 2:00 – 5:00 ptm: Lecionoj (Vergara)
- ★ 5:30 ptm: Vespermanĝo
- ★ 6:15 – 6:55 ptm: Derek ROFF prelegos pri “**Kiel mi tradukas kaj preparas Esperantajn bildrakontojn**”  
*Flowe 114*
- ★ 7:00 – 8:00 ptm: Estos du mallongaj programeroj sinseke en la sama ĉambro (*Flowe 110*):
  - Alekso MILLER montros kaj legos sian novan dulingvan infanlibron “*Captain Katie and the Peanut Butter Plunder / Kapitano Katarino kaj la Aĉa Arakido*”  
– kaj –
  - Mara kaj Kasia intervjuiĝos de Liĉjo
- ★ 8:00 – 9:00 ptm: estos du programeroj samtempe:
  - Renato CORSETTI prelegos pri “**La Bona Lingvo**”  
*Flowe 110*  
– kaj –
  - Charlotte BURTON prezentos pri “**Nu, mi lernas bone ĉe NASK, sed kion poste?**”  
“**Well, I’m learning well at NASK, but what next?**”  
Kunvenu kun ni por lerni pri bona metodo por krei celojn por la estonteco.  
*Flowe 114*

## Kiel traduki kaj prepari Esperantajn bildrakontojn

Derek ROFF priskribas sian prezenton kiu okazos ĉi-vespere

Malofte mi vidas bele faritajn spritajn, satirajn, aŭ amuzajn bildrakontojn kun klare legebla Esperanta teksto. Tro ofte, la ideo estas bona, sed la realigo estas malklara kaj malbela pro tehnikaj mankoj. Ĉu vi iam deziris traduki kaj krei spritajn en Esperanto, kaj ne sciis kiel realigi tion? Mi montros mian aliron por akiri bonajn ekzemplerojn de la fontaj bildoj, kiel forigi la malnovan tekston, surmeti la Esperantan tekston, kaj elmeti la rezulton, per relative rapida sistemo. La sesio daŭros 40 minutojn. Vespermanĝu frue, kaj venu al la klasĉambro de José Antonio (*Flowe 114*) je la 6:15 ptm. Ni finos antaŭ la programo de Alekso Miller je la 7a horo.




## Nova infanlibro pri la pirato Kapitano Katarino

Alekso MILLER estas la aŭtoro de tri poeziaj libroj por infanoj. Ĉiu libro estas dulingva (angla/Esperanto), kaj traktas temojn relataj al alergio.

Ĉi-vespere, li montros kaj legos sian plej lastan libron, *Captain Katie and the Peanut Butter Plunder / Kapitano Katarino kaj la Aĉa Arakido*.

Eblus aĉeti la libron, kaj liajn aliajn du librojn:

- *Captain Katie: The Pirate Allergic to Gluten / Kapitano Katarino: La Pirato Alergia je Gluteno*
- *Captain Katie and the Malt of Doom / Kapitano Katarino kaj la Malto de Veneno*



La prezo por ĉiu libro estas kvin dolaroj (nur por NASKanoj).

# Penso pri *La Ŝtona Urbo* de Anna Löwenstein

de Walter MURAWSKI

La protagonisto en *La Ŝtona Urbo*, verkita de Anna Löwenstein, nomiĝa Bivana. Ŝi estis 15-jaraĝa knabino, kiu loĝis en vilaĝo en suda Britujo dum la unua jarcento de la nuna epoko. Ŝia vilaĝo estis atakita de la roma armeo kaj ŝi estis kaptita kaj forprenita al Romo. En Romo ŝi estis vendita kiel sklavino.

Tuj post la vendo, la homo kiu aĉetis ŝin venis kaj prenis ŝin de la podio. Ŝi devis lin sekvi. “Kaj mi ja sekvis lin kiel hundeto. Efektive, mia ĉefa timo estis tio, ke mi perdos lin inter la homamaso.”

Estas interesa, ke Bivana ne provis, eĉ ne pensis pri la ebleco eskapi. Ŝi ne povis. Ŝi ne konas la lingvon, kaj neniu konas ŝian lingvon. Ŝi konas nek la landon, nek la urbon, en kiu ŝi troviĝis. Ŝi ne havas eblon forkuri reen al sia propra lando. Ŝi ne konas la vojon, eĉ ne scipovas peti la vojon. Ŝia sola espero estas sekvi kaj ne perdi la homon, kiu ŝin aĉetis.

Pensante pri tio, mi demandis min: ĉu en nia nuntempa socio ne ekzistas homoj sklavigitaj de cirkonstancoj? Oni diras “stultulo, kial vi ne forlasis?” Sed la homo, nur malfacile, provas klarigi – sukcece aŭ nesukcese – ke tio ne eblas.

## Ŝercoj

de Don McINTOSH

- Mono povas fari ĉion. La mia povas tre facile diri, “Adiaŭ!”
- Seksumado estas heredita. Se viaj gepatroj ne faris ĝin, ankaŭ vi ne faros.
- Vi simple envias, ĉar la voĉoj parolas nur al mi!
- Jen mi! Kiuj estis la aliaj du petoj de la genio en la lampo?

# Enigmo: Kiu havas la zebbron? Kaj kiu trinkas plej volonte akvon?

el la LERNILOTEKO de [edukado.net](http://edukado.net)  
de Katalin KOVÁTS

Kiu havas la zebbron? Kaj kiu trinkas plej volonte akvon?

Tiuj estas la du demandoj, al kiuj vi devas trovi la respondon laŭ la 14 subaj asertoj. La solvojn vi povas peti de la redaktoro.

- 1) La anglo loĝas en la ruĝa domo.
- 2) La hispano hundon havas.
- 3) En la verda domo oni trinkas kafon.
- 4) La rusoj teon trinkas.
- 5) La verda domo staras maldekstre de la blanka (rigardate de ni).
- 6) La persono kiu legas *Monato* havas abelojn.
- 7) En la flava domo oni legas *Esperanto*.
- 8) En la meza domo oni trinkas lakton.
- 9) La norvego loĝas en la unua domo.
- 10) En la domo apud la kato oni legas *Kontakto*.
- 11) En la domo apud la ĉevalo oni legas *Esperanto*.
- 12) La leganto de *IPR* trinkas pomsukon.
- 13) La japano legas *El Popola Ĉinio*.
- 14) La norvego loĝas apud la blua domo.



	1	2	3	4	5
Revuo					
Nacieco					
Dombesto					
Trinkaĵo					
Koloro					